# EKO 2025

**Unesko en Samarkando**

EKO 2025-40, Oktobro 16  Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Sume ? KB

## Espere, ke Kasati iru al Samarkando

La Ĝenerala Konferenco de Unesko, **de la 30-a de oktobro ĝis la 13-a de novembro**, estos unika plurflanke. Ĝi okazos en Samarkando (Uzbekio), unuafoje en Azio depost 1956, kaj unuafoje ekster Parizo depost 1985. Kaj al la Ĝenerala Direktoro de Unesko kandidatigis du afrikanoj: Firmin Edouard Matoko el Kongo DR kaj Khaled al-Anani el Egiptio. Gajnis la egipto, sed la formala elekto okazos en Samarkando la 6-an de novembro. Unesko ĝis nun adoptis du rezoluciojn favorajn al Esperanto, precize dum Ĝeneralaj Konferencoj ekster Parizo (Montevideo 1954 kaj Sofio 1985) kaj la sola ĝisnuna Ĝenerala Direktoro de Unesko el Afriko, Amadou Mahtar M'Bow (de 1974 ĝis 1987), tre favoris Esperanton.

TEJO elektis sian estraranon pri instruado, **Espoir Kasati**, el Kongo DR  por reprezenti ĝin en Samarkando. Ĉar TEJO ankoraŭ ne estas oficiala partnero de Unesko, li venos kiel reprezentanto de UEA, kaj UEA estos reprezentata entute de sep-opa delegacio, la aliaj membroj vojaĝos tien proprakoste. Sed li interalie traktos por progresigi partneradon de TEJO kun Unesko, en momento, kiam Unesko tre bezonas junularan agadon (kaj elektis Afrikon kiel prioritaton). Espoir jam solvis la problemon pri vizo kaj trovis preskaŭ duonon el la financado de sia vojaĝo, sed **ankoraŭ mankas 1500 € por finpagi** la vojaĝ- kaj restad-kostojn. Ni kalkulas pri viaj malavaraj donacoj por permesi al Espoir partopreni en tiu grava unika evento, la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Samarkando. Donacojn oni direktu **al la fondaĵo Unesko de UEA**: https://uea.org/alighoj/donacoj/unesko, kun donackialo "Samarkando". Antaŭan dankon.

François Lo Jacomom Estrarano de UEAn Reprezentanto de UEA ĉe Unesko

## Kie la postvenonta kongreso de UEA?

Post Brno (2025) kaj Graco (2026) la Estraro de UEA preferas, ke en 2027 la UK okazu ekster Eŭropo. (***SMG*** konsentas!). Ĉar dum la postpandemiaj jaroj UK jam okazis en Ameriko (Montrealo, 2022, sed virtuale) kaj Afriko (Aruŝo, 2024), UK-112 verŝajne okazu en Azio aŭ Oceanio.*La Ondo de Esperanto* publikigis demandilon kun listo de 12 aziaj kaj oceaniaj landoj kun relative forta movado. La demandilo estos respondebla ĝis la fino de septembro. Ni petas respondi: **en kiu el ĉi tiuj landoj vi preferus kongresi en la 2027-a jaro?** La demandilo estas ĉi tie https://sezonoj.ru/2025/09/demandilo/ Dankon pro via kunlaboremo!

## Junulara Eo-renkontiĝo kun 700 partprenantoj...!

La Eo-societo de la urbo Nyíregyháza organizis du-tagan grupan ekskurson al la urbo Tata, Hungario, kie oni vizitis ankaŭ 2 ZEO-jn. Unun en la urbo mem, instalitan en la jaro 1980 okaze de "Junulara Esperanto-Renkontiĝo", JER kun 700 (!!) partoprenantoj, kaj la alian, "Fonto Esperanto" en la proksima arbaro apud vilaĝo Piliscsév. Dommastroj estis la membroj de la urba Eo-societo de Tata. - La vizito ĉe la zeo-j kompreneble validas por ĉiuj partprenantoj kiel novaj poentoj por la speciala diplomo "ZEO-HU"



SMG mem partoprenis en tiu JER  vojaĝinta trajne el Budapeŝto. Venis amase homoj el la iama  Ĉekoslovakio kaj ĉefe Pollando – centoj da polaj krokodiloj, kiujn la estiminda ege idealisma polo Andrzej Grabowski alportis. Li bedaŭrinde kaj ne atendite mortis en Argentino tuj post la UK tie.

## Mirejo respondas pri akiro de parolkapablo

Evidente, bani en Eo-medio estas la plej bona maniero progresi en la lingvouzo. Tio povas okazi en Eo-centroj kiel Grésillon, en Kultura Centro Esperantista en la okdekaj jaroj, tie en La Chaux-de-Fonds mi lernis la lingvon. Plie laŭ Zlatko Tisljar en tiaj Eo-centroj estas esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj de la mondo, do la komencanto estas devigata ekuzi la lingvon kaj ne povas eskapi en krokodiladon. La komencanto tuj konstatas kaj sentas konkrete la bezonon uzi nian lingvon kaj la miraklon de tia komunikado. Bani en esperanta medio spronas la motivadon de ĉiuj.

Mi ne dirus, ke " Ŝajnigaj teatrecaj ekzercoj en lernoĉambro estas senefikaj." Evidente ili ne similas al la supre priskribitaj veraj situacioj, sed ili ebligas ekzerci paroladon, senti la encerban laboron de elekto de vortoj, almeto de la ĝustaj finaĵoj, zorgi pri vortvico kaj ĝusta prononco. Senti kaj trejni la eksterordinaran encerban laboron, kiu okazas dum parolado, post dedico de tio, kion oni volas diri. La vojo inter mia penso kaj mia dirita frazo estas longa, komplika kaj tikla. La parolanto devas vesti siajn pensojn per la lernenda lingvo uzante ĝiajn eblojn, kiuj ne nepre koincidas kun la ebloj de la gepatra

lingvo. Pro tio komencantoj fine de plena tago en Esperanto-medio sentas lacecon. Tio estas normala simptomo. La programo "Ekparolu" de edukado.net ofertas al komencantoj eblon ekzerci paroladon; tre efikaj momentoj.

Mirejo Grosjean




## Togolanda kunsido en Universitato

Nia Esperanto-kunveno, okazinta la 4-an de oktobro 2025 en la universitata centro St de Lome. Mi prezentos fotojn pri la ĵus pasinta UK en Brno kaj ankaŭ rakontos pri propraj impresoj de la kongreso.

## Alvoko al Himalajoj

La Nepala Esperanto-Asocio ĝojas anonci la 15-an Internacian Himalajan Renkontiĝon 2026, celante prezenti la landon kaj ĝian kulturon kaj naturon al alilandaj esperantistoj. Malmultaj landoj en la mondo povas konkuri kun Nepalo rilate naturan, lingvan, etnan kaj kulturan diversecon. Partoprenante la renkontiĝon, vi havos ŝancon formi vian propran bildon pri la lando kaj samtempe konatiĝi kun lokaj kaj alilandaj esperantistoj. Ni bonvenigas ankaŭ homojn, kiuj volas eklerni Esperanton dum la renkontiĝo.

La programo estas planita por taŭgi al ĉiuj aĝgrupoj. Dum via restado, vi loĝos en bonkvalitaj hoteloj en Katmanduo kaj en komfortaj gastejoj aŭ tendoj dum la piedvojaĝo. La aliĝkotizo inkluzivas ĉiujn loĝkostojn, transportokostojn, manĝokostojn kaj aliajn similajn elspezojn, krom asekuro. Similaj turismaj servoj kutime estas multekostaj, sed multaj el niaj servoj estas volontule disponigitaj de nepalaj esperantistoj.

La ĉefa kialo por la renkontiĝo estas praktiki la lingvon. Nepalanoj apenaŭ povas vojaĝi por partopreni eventojn eksterlande pro financaj kialoj kaj vizaj problemoj. Lingvo bezonas praktikon kaj utiligon – sen tio, ĝi ne ekzistas. Ni do invitas eksterlandajn esperantistojn helpi nin plifortigi la movadon en nia lando.

## Konkurso por novaj verkantoj

### PREMIO ANDREA CAMILLERI – NOVAJ VERKISTOJ

Jen la gajnintoj de la unua eldono 2025

Septembre ĉeTeatro Quirino "Vittorio Gasmann" en Romo okazis la premiado de la gajnintoj de la unua eldono de Premio Andrea Camilleri Novaj Verkistoj.La gajnintoj de la unua eldono estas: por la kategorio **radiodramo Adriano Saleri** kaj **Mario Migliucci** por la sekcio “chiù picca di sissanta” [.

Michela Lipari

## Novaĵoj el Kostariko

Jam de kelkaj monatoj en la Fako pri filologio, lingvistiko kaj literaturo de la Universitato de Kostariko oni restrukturigas la programaron de la kariero. Esperanto, kiel kurso je bakalaŭra nivelo, devus, principe malaperi. Hodiaŭ estis kunveno por diskuti plurajn aspektojn de la nova programaro, Esperanto ne plu estos kurso je bakalaŭra nivelo, sed mi sukcese defendis ĝin; do, ĝi estos postbakalaŭra malfermita al ĉiuj karieroj (fakoj). La restrukturado estas ankoraŭ en proceso, mi informos vin pri la evoluo.

Antonio Leoni

*Pro tiu informo, la ĉiam aktiva prezisanto de ILEI reagis gratule:*

Gratulojn pro via sukcesa defendo de Esperanto en tiom grava momento. Estas tre kuraĝiga novaĵo, ke la kurso restos viva kaj eĉ akiros pli vastan atingon k l postbakalaŭra programo malfermita al ĉiuj fakoj. Ni ĝojas kun vi kaj deziras al vi forton kaj persiston dum la venontaj paŝoj de la restrukturado.

Ahmad Mamduhi

## Alvoko por verkemo kreiva

En la retejo **uea.facila** aperis nova artikolo, kiu interesos ĉiujn, kiuj ŝatas legi kaj verki:

**Ĉu vi revas verki romanon?** La artikolon verkis **Stela Besenyei-Merger**. Ŝi rakontas pri la internacie konata projekto *NaNoWriMo* (Nacia Roman-Verka Monato) kaj pri ĝia Esperanta inspiro – **Monda Verk-Monato (MoVeMo)**. Vi ekscios, kiel la ideo ekestis, kiuj estas la reguloj, kaj kiel ankaŭ esperantistoj povas partopreni en ĉi tiu krea defio.

## Kiu estonto por la domo?

La 26-an de septembro 2025, la Estraro kaj la Ĝenerala Direktoro de UEA sendis al la Komitato de UEA kvarpaĝan raporton pri la oficeja domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo. Legu pli en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/uea-97/.

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Tridek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.